Año IX (N.º 104-105)

Núms. 8-9

# Boletín

DE LA FEDERACION ESPERANTISTA ESPAÑOLA


AGOSTO SEPTIEMBRE 1957

PELAYO, 7
VALENCIA
(ESPAÑA)

[illegible]








Sur perono, antaŭ la bela fasado kaj triporda enirejo de la Nacia Biblioteko.



Oni surmetis florkronon ĉe la Monumento al D-ro Carlos Cortezo



S-ro P Górgolas, ceremoniestro de Madrido, inter S-roj Herrero, Figuerola kaj Ezquerra

## EKZAMENOJ DE ESPERANTO

Kiel membroj de la Tribunalo kontrolinta la ekzamenojn de Esperanto, kiuj okazis en la kadro de la 18ª Hispana Kongreso, ni deklaras, ke, en ĉiu el la du branĉoj, ricevis aproban kvalifikon, kun rajto por la koncerna diplomo, la sekvantaj kandidatoj:

**ELEMENTA KAPABLECO. — Atanasio Sinués, Rafael Ayala, Severiano Arnaiz, Teresa Lladós de Mimó, Juan Antonio Madrazo, Juan Manuel Gutiérrez, Rafael Gisbert, Angel Pérez Saura, Mariano Cantalapiedra, Venancio Monsalve, José Morales, Alberto Mimó Lladós.**

**INSTRUITECO. — Atanasio Sinués, Rafael Gisbert, Venancio Monsalve, Severiano Arnaiz, Angel Pérez Saura, Rafael Ayala, Teresa Lladós de Mimó, Mariano Cantalapiedra, Juan Manuel Gutiérrez.**

En Madrido, la 28an de Julio 1957

*Delfí Dalmau — Juan Rĕgulo Pérez — Luis Hernandez*

**ESPERANTO 70-JARA.** —Multajn jarojn signifas tiu aĝo en la vivo de homo; sed, por lingvo --por lingvo ordinara-- tio estas apenaŭ komenco. Tamen, Esperanto, rigardata ofte, malgraŭ sia eksterordinareco, laŭ tute banalaj homaj konsideroj, ŝajnas esti tro juna por unuj, aŭ tro maljuna por aliaj... Jen kurioza kontrasto de opinioj, kiujn la esperantistoj neniel devas atenti, ĉar, kiel efektivaj praktikantoj de la Lingvo Internacia, sperte ili scias pri la kultura kaj socia potenco, en senhalta evoluo, de tiu plej konkreta lingva universalismo, kiun Esperanto donis al sia Movado --vere *jam* nedetruebla-- dum la daŭro de nur 70 jaroj.

## EN MARSEILLE, APUD LA MEDITERANEO, OKAZIS LA 42ª UNIVERSALA KONGRESO

En la bela suda franca urbo, kolektiĝis preskaŭ 1500 gesamideanoj el 38 landoj. Meze de ĉarma mediteranea somero, ili pasigis neforgeseblajn tagojn, de la 3.ª ĝis la 10.ª de Aŭgusto. La urbo eldonis dulingvan bonvensaluton, kiun oni publike alfiksis. En la Solena Inaŭguro, vice de ceteraj landaj reprezentantoj parolis, nome de nia Federacio, S-ro Fernando Bayo, el Bilbao; tre elstaraj estis la Festparolado de D-ro Ivo Lapenna kaj la prelegoj en la Internacia Somera Universitato, same kiel la fruktodona laboro de la Sekcioj, kiuj aprobis interesajn rezoluciojn. Aparte menciinda por ni estas la sukcesplena prezentado de «Georgo Dandin» kiun bonege ludis la Esperantista Teatra Trupo de Barcelono, sub la gvido de nia kara fervorulo F. Vilá; pasintan jaron, ni havis okazon konstati la kapablon de tiuj amatoraj geaktoroj, en la sama komedio, dum nia landa kongreso. Krom la ordinaraj laboroj, en kunsidoj kaj komitatoj, oni abunde amuziĝis en ekskursoj kaj festoj. La katolika meso okazis en «Notre-Dame de la Garde» kun Esperanto-prediko de Pastro M. Carolfi. Venontjare, la 43ª Universala Kongreso okazos en la germana urbo Mainz.

## LA 30ª KONGRESO DE S. A. T. LABORIS EN ROTTERDAM

*En tiu rekonstruita nederlanda urbo, kiu per si mem estas titana monumento, kongresis plej fruktodone, de la 3ª ĝis la 9ª de Aŭgusto, 590 membroj el 15 landoj. En la Solena Malfermo paroladis, kiel honorprezidanto, la ĉefministro de Nederlando. D-ro W. Drees.*

*Inter du prelegoj kaj tri laborkunsidoj, ankaŭ estis tempo por fakaj kaj frakciaj kunvenoj, aŭ por ekskursoj kaj vizitoj. Treege interesa estis la geknaba kongreseto, kiun partoprenis 61 infanoj el 7 landoj. La venontjara kongreso okazos en Helsinki. ĉefurbo de Finnlando.*

# CON RAZONADA PERSISTENCIA

**A pesar de las múltiples dificultades que se combinan para entorpecer la marcha progresiva del esperantismo español —entre las cuales destacan las de índole económica—, los sucesivos congresos anuales han venido celebrándose, con rítmica regularidad, demostrando con ello la fé, el entusiasmo y el alto nivel moral de los esperantistas españoles, siempre unidos y hermanados.**


**La celebración del último congreso en la capital de España, ha sido la confirmación de esas virtudes; la constitución de su alto Comité de Honor es la prueba del creciente aprecio que el Esperanto va conquistando en las altas esferas de la nación. Las más destacadas Jerarquías, en todos los aspectos de la vida nacional, han patrocinado nuestra reciente asamblea federativa, dando así a nuestro movimiento idiomático el espaldarazo de su alta estima y consideración.**

**Pero, digámoslo una vez más; todo ello no significaría un futuro halagador para nuestras esperanzas, si fallase la base fundamental de nuestra Federación, cual es, sin duda alguna, el fervor y la inquebrantable cohesión de los samideanos españoles, que ayer dieron su última prueba en Madrid, y que mañana la reiterarán, con ejemplar entusiasmo y con loable persistencia, seguramente en el marco acogedor de una hermosa y atractiva ciudad mediterránea...**

## CONCLUSIONES ADOPTADAS POR EL CONGRESO DE MADRID

**a) Dirigír escrito al Ministerio de Educación Nacional, en solicitud de la enseñanza obligatoria del Esperanto en todas las Escuelas Normales, y con carácter voluntario en los Institutos y Universidades Laborales, como un primer paso para la implantación general.**

**b) Dirigir escrito al Ministerio de Información y Turismo, solicitando la edición de un folleto en Esperanto, para la propaganda turística de España, poniendo los servicios de la Federación a disposición del Ministerio, para los trabajos de redacción del mismo.**



**EN AGRABLA ATMOSFERO DE RADIANTA SIMPATIO BRILE OKAZIS LA**

# 18ª HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO

**Kiu, sole nur kun siaj 307 partoprenantoj el 361 aliĝintoj (inter ili pluraj eksterlandanoj) sukcesis, dum la daŭro de tuta semajno, doni noton de aktualeco al Madrido, la impona metropolo kun preskaŭ du milionoj da enloĝantoj, kiuj rekte ricevis la influon de nia entuziasmo. Tra sinsekva malavara regalado, fare de la aŭtoritatoj, elstaraj prelegoj kaj seriozaj taskoj de utila laboro alternis kun vizitoj aŭ ekskursoj al palacoj, institutoj kaj muzeoj**

Arda sopiro de la hispana esperantistaro estis kongresi en Madrido, la ŝtata ĉefurbo. Nu, fine do jam efektiviĝis la revata deziro! Kaj ĝi efektiviĝis laŭ maniero tiel brila, tiel hele sukcesa, ke forkure malaperis la timigaj fantomoj, kiuj inkube malkvietigis la dormon de la organizintoj, ĉu la arda sopiro de longa atendado iĝos glacia disreviĝo en la decida momento... Sed ĝojiga fakto estas, ke la realo superis plej optimistajn esperojn.

Pravigante la aserton, ke horoj feliĉaj tro rapide forflugas, la kongresa semajno efemere pasis, kiel subtila spiro de amanto en ekstazo. Kun la modela, konscia kaj jam tradicia disciplino de nia anaro en la naciaj renkontiĝoj, pli ol tricent gekongresanoj, en kompakta amaso, spite la varmon de rigora somero, spite la ĝenon de multkilometraj distancoj, en kreskanta urbego, akurate ĉeestis kaj diligente vivigis ĉiujn aranĝojn de densa kaj tre altvalora programo, en kiu estis oportune reprezentataj plej variaj aspektoj de la Arto kaj Kulturo: muzikaj koncertoj, eminentaj prelegoj, fruktodonaj fakkunsidoj, vizitoj al famaj muzeoj, sciencaj institucioj kaj reĝaj palacoj, krom ekskursoj al vidindaj lokoj, kie la Historio fariĝis evidenta kaj tute konkreta materio el ĉizitaj ŝtonoj kaj forĝita fero.

Cetere, kiel plej franda komplemento, la ĝentila afableco de la urbaj kaj provincaj aŭtoritatoj malavare kaj ŝike regalis la partoprenintojn de nia 18ª tutlanda kunveno per riĉaj unuarangaj lunĉoj en la feina medio de la ĝardenoj de «El Retiro», en la kosmopolita teraso de Hotelo «Victoria» de El Escorial aŭ en la hejmeca salono de la urbodomo de Toledo, la iama imperia vizigota ĉefurbo, ankoraŭ nun respektinda relikvujo plenŝtopita de ĉiuspecaj juveloj, kun la evoluintaj stiloj de rafinita arkitekturo.

Funde eraras la opinio, ke Madrido, kiel ĉiuj grandaj ĉefurboj kutimiĝintaj al oftaj unuarangaj spektakloj, estas indiferenta al modestaj sed idealistaj entreprenoj. Ne, tute ne; promenante surstrate, aŭ veturante interne de tramoj, aŭtobusoj kaj subtera vagonaro, la kongresanoj plaĉe perceptis la impreson de natura simpatio, kiun vekis la bela kongresa insigno —arta medalo el metalo pendanta de verda silkaĵo— fiere portata ĉe jakoj aŭ bluzoj. Krome, tie mem, en la koro de la urbego, en la tipe karakteriza placo *Puerta del Sol* (Pordo de la Suno) kaj en ĉiuj el ĝi radie ekiĝantaj stratoj, centoj kaj centoj da ekzempleroj de nia gaja afiŝo pompis gluitaj, tre malalte kaj okulfrape, sur la muroj de modernaj konstruaĵoj, eĉ sur multekostaj marmoroj aŭ apud la logaj vitroj de luksaj magazenoj. Kvankam facile atingeblaj per la mano, tiuj niaj kolorriĉaj reklamiloj restis sendifektaj dum tagoj kaj tagoj, daŭre atentigante la senhaltan svarmon da preterpaŝantoj, ke la hispanaj adeptoj de la Lingvo Internacia fervore kunvenas kaj festas.

Jes, oni kunvenis kaj festis en ludo de plej variaj kontrastoj, kiuj tamen kongruis kun la spirito de unu sama harmonio; ĉar, ekzemple, egala konkordo regis inter ni ĉiuj —kvankam tute malsama la etoso!— dum la religia ceremonio de Solena Meso, kun Esperanto-prediko, en la grandioza templo de Sankta Francisko, la Granda; kaj ankaŭ dum la vibranta vervo de la Literatura Festo, en la palaco de «Centro Asturiano» aŭ dum la bunta gastronomio de la Oficiala Bankedo, sub libera ĉielo, en la Sindikata Parko... Gratulon sinceran meritas ja la sindonemaj organizintoj, kiuj, ĝis ekstrema elĉerpiĝo de siaj fizikaj fortoj, klopodis por ebligi la mirindaĵojn de nia neforgesebla parado, antaŭ la plej superaj hispanaj instancoj, en ilia propra oficiala sidejo: Madrido!

Tamen... —jen do la tikla vorteto por pravigi la aserton, ke ne estas regulo sen escepto— la helajn reflektojn de nia 18ª Kongreso iomete difektas la bedaŭrinda sed deviga decido provizore dumonatigi la aperon de BOLETIN ĝis kolektiva samideana strebado sukcesos redoni al la budĝeto de nia Federacio la necesan ekvilibron. Estas vere domaĝe, ke la financoj ligos la flugilojn de nia flugema kuriero. Espereble, por ne longe...

◆ ■ ◆

Frue en la mateno, lunde, la 22an de Julio, de antaŭ la centra Poŝtoficejo de Valencio, granda aŭtobuso startis kun gaja grupo da gesamideanoj —mi inter ili— kaj la gvida stabo de la Federacio, en direkto al Madrido, la nunjara magneta celo por la hispana esperantistaro. Post vigla marŝo de dudek-kvin kilometroj tra kampoj kaj ĝardenoj, ankoraŭ interne de Valencia teritorio, la veturilo haltis en Cheste, la konata esperantista vilaĝo, kies blanka domaro, ĉirkaŭ bruneta sonorilturo de la preĝejo, kuŝas sur vaste etendiĝanta valo, kiu estas simbole kolorigita per ĉiuj plej fantazie imageblaj nuancoj el verdo de siaj artmetie kulturitaj bedoj. Tie, aro da lokaj geamikoj kompletigis la ekspedicion, kiu iĝis tiam ne ja nur kompleta, sed ankaŭ orname garnita pro la beleco de la ĵus venintaj chestaninoj, kiuj portis aromon, kiel freŝa bukedo da rozoj —ankoraŭ kun roso ĉe la petaloj— apud la polurita ĉarmo de la valencianinoj.

La veturo ree daŭras; kantoj kaj babiloj pliviglîĝas, dum la pejzaĝo iom post iom ŝanĝiĝas, bruniĝas... La motoro plende zumas pro streĉita peno ĉe la akutaj deklivoj aŭ profundaj zigzagoj de Contreras, la abrupta interkrutejo kaj natura limo inter Valencio kaj Kastiljo. Jam firme sur la transa flanko, la betona rubando de la ŝoseo estas griza linio, tra orumita maro da maturaj spikoj aŭ sekaj ondantaj spacoj de tero rostita, sub ĉielo sennuba kun suno rigore premanta. Jen do jam supre sur la kastilja altebenaĵo! Kvankam monotona, la panoramo kuraĝige impresas; plilaŭtiĝas la kantoj kaj babiloj, kiel kontraŭstaro al la peza kvieteco de l'dezerto...

Subite, kvazaŭ fatamorgano, kamparaj dometoj ekmontriĝas ĉe la horizonto, kun logaj makuloj de ombro, sub la foliaro de malfortikaj arboj. Ho! feliĉe, ne iluzia miraĝo, sed Motilla de Palancar, vilaĝo ***providence*** lokita apud la vojo, kun tre bonaj modernaj instalaĵoj, kiel taŭga haltejo por vojaĝantoj. Plaĉe obeante la kutimon, ni ĉiuj desaltas de la aŭtobuso kaj plezure sidas en proksima ĉambro por iom ripozi, manĝeti kaj avide trinki. La paŭzo, tamen, ne multe daŭras, ĉar la tempo urĝas por ĝuste oportuna alveno.

Plia kaj lasta halto en Tarancon indikis komencon de la fina etapo. Denove la pejzaĝo iomete ŝminkas sin per diverskoloraj farboj. Vilaĝetoj kaj urbetoj apudas unu la alian, kiel efektiva parto de loĝata ringo aŭ ĉirkaŭaĵo de la celata metropolo. Aroge, nia aŭtobuso penetras en ĝiajn unuajn stratojn: svarmo da homoj, abundeco da butikoj, kun okulfrapaj anoncoj, kaj rapidega fluo da veturiloj jen estas la bildoj, kiujn nun montras —kiel ekrano de aparato por televidado— ĉiu el niaj fenestroj. La centraj avenuoj prezentas dise, tra elegantaj perspektivoj, fasadojn kaj monumentojn, kiuj estas tre populare konataj pro ilustraĵoj kaj bildkartoj. Meze de ampleksa placo estas la fama fontano kun la bele skulptita diino Cibeles, kiu

trankvile sidanta sur ĉaro tirata de leonoj kvazaŭ prezidas la trafikon, kiu fulme karuselas ĉirkaŭe. Tute najbare, en proksima angulo, apud dekstra flanko de la majesta palaco por Poŝto kaj Telegrafo, funkcias la bremso de nia aŭtobuso, kiu haltas anhele, je la tria posttagmeze.

Emocia momento! Aplaŭdoj kaj ĝojkriaj salutoj, vivuoj kaj huraoj, aklamas la karajn amikojn Dario Rodríguez, Florencio Enfedaque kaj Jaime J. Forné, kiuj, kune kun aliaj madridaj samideanoj, nin tie atendadis. Oni demandas, oni respondas, oni interŝanĝas ĉirkaŭprenojn kaj... oni zorgas pri siaj valizoj, kiuj, mem sur la pavimo, formas barikadon. La madridanoj informas kaj orientas pri plej taŭga rimedo por trafi la gastejon aŭ pensionon, pri kiu oni ne sciis antaŭe, ke ĝi troviĝas tute ĉe alia ekstremo de la urbego...

Tamen, post zorge detala kaj pacienca klarigado, faciliĝas la malfacilaĵoj kaj, sciante jam pri la morgaŭa rendevuo, la samideana amaso, kun ideala ŝarĝo de agrablaj esperoj kaj... kun tiu alia pli peza de pakaĵoj kaj tekoj, dissplitiĝas ĉiudirekten, renkonte al la loĝejoj, kiuj --provizoraj hejmoj-- pli malpli konvene, certe utilos por ebligi ripozon kaj doni ŝancon —al la junulinoj, precipe!-- je taŭga plibeliĝo, por paradi kaj koketi dum la tuta daŭro de la ĉi-jara promesplena esperantista festo.

Kiel simpla mortulo, ankaŭ mi kun valizo kaj teko treege pufita devis pilgrimi al konvena loĝejo; la afableco de S-ro Forné ŝparigis al mi senutilan vagadon. Tre amike li akompanis kaj gvidis min, kvazaŭ sperta madridano, ĝis modesta sed plaĉa pensiono, en domo ĉe angulo de kvieta placo. Post purigo kaj manĝeto, amiko Forné *inicis* min pri la *sekretoj* de la madridaj transportiloj: tramoj, trolebusoj, taksioj kaj subtera fervojo. Mi *debutis* tiurilate; kaj, komforte sidante en trolea veturilo, mi atingis ekstreman kvartalon, en kiu troviĝas la hejmo de S-ro Angel Figuerola kaj la sidejo de la Organiza Komitato; efektive, nia blinda samideano kaj dinamika prezidanto aspektis en sia kontoro, ĝuste en la momento de mia alveno, kiel brava generalo en komandejo antaŭ plej decida batalo: demandoj, respondoj, vokoj, ordonoj, admonoj k. t. p, per telefono; aŭ diktado de leteroj, cirkuleroj, gazetinformoj k. t. p. al deĵorantaj samideanoj ĉe skribmaŝino; sen forgeso pri la urĝa neceso fari ankoraŭ plurajn personajn vizitojn al gravaj oficialuloj. Tamen, vere mirinde, li ankaŭ povis trovi tempon por bonvole min saluti kaj eĉ koncize rakonti pri la stato de la diversaj aranĝoj en ilia lasta fazo. Insista telefona voko petas lin ankoraŭfoje veni tuj al ia Ministrejo.

Taksio atendas ĉe la pordo de lia domo; inter S-ro D. Rodríguez kaj S-ro Angel Figuerola, mi ekveturas, aŭskultas informojn kaj... gapas surstratajn vidindaĵojn, laŭ turnoj de lertaj manovroj de nia ŝoforo, preter trafiko en akcelo. Refoje en la koro de la urbo, mi lasas la du respondeculojn, ke ili daŭrigu siajn demarŝojn en oficiala konstruaĵo. Adiaŭinte tiel fervorajn amikojn, ĝis morgaŭ, mi pensas pri la eblo trovi aliajn en la ejo de la Madrida Klubo, kiu ŝajne situas ne tre malproksime. Post orientiĝo, tien mi adresas miajn paŝojn. De sur la ŝtuparo, mi aŭdas voĉojn kun klara esperanta prononco; renkonte al ili, mi eniras en salonon, kie cirklo da ŝegoj estas katedro por grupo da gesamideanoj.

Inter ili —ho, ĝoja surprizo!— troviĝas distinginda amiko, ankoraŭ ne persone konata, sed kore kara, S-ro Juan Régulo Pérez, akademiano kaj profesoro en la Universitato de La Laguna (Kanariaj Insuloj). Jes, nekonfuzebla estas lia rondeta vizaĝo, kun serena iom flegma mieno, ***klerigita*** per grandaj okulvitroj kaj okaze lumigita per simplanima infana rideto. Instinkte, niaj manoj kuniĝas en frata interpreno, antaŭ ol vortoj ŝprucos el buŝoj, en sinceraj salutoj, al ĉiuj ceteraj geamikoj. Ree fluas ĝenerala konversacio, kies ĉefa temo, kompreneble, estas la tute proksima festo kaj ĝiaj interesaj aranĝoj.

Jam en plena noktomezo, oni atentigas pri foriro, dum kelkaj ekmemoras tiam, ke ili ankoraŭ ne vespermanĝis... Decas disiĝo; tio efektiviĝas pogrupe, ĉiu en sia direkto, por doni al la korpo ripozon kaj dormon, kio liveros novajn energiojn, kiujn volonte oni malŝparos honore al la brilo de la grava evento, kiu morgaŭ —ĉu ne jam hodiaŭ?— ĝuste kaj orde komenciĝos...

## MARDE — 23. JULIO

Matena vekiĝo ekster la kutima dormoĉambro impresas iom strange, almenaŭ la unuan fojon. Sed, por la diligentaj kongresanoj, la aŭroro de tiu mateno estis kiel scenejlumo, antaŭ leviĝo de kurteno en plej ŝatata prezentado. La tuta Madrido, transformita por ni en mirinda scenejo, tentas al observoj kaj rigardoj. Laŭ tio, la membroj de la Valencia karavano, precize je la deka, rendevuis en la placo Hispanio, fronte al la aroga domego --kiun niaj reklamiloj diskonigis-- por sperti la plezuron de

### PROMENADO PER AŬTOBUSO

La hieraŭaj pasaĝeroj estas nun pretaj turistoj, kun refreŝigita humoro, pro efiko de bona dormo, kaj kun nova aspekto, pro zorga traserĉo en la valizoj. Jam ĉiu en sia sidloko, kelkaj kun *hazarda* ŝanco najbari al ĉarma fraŭlino, oni instigas la kondukiston al tuja starto. Nu, baldaŭ ekturnas la radoj, desegnante sur tabulojn el asfalto la reliefajn striojn de siaj pneŭmatikoj, sub la premo de la pezo de kvindeko da gesamideanoj. Denove, la fenestroj iĝas ekranoj por vivanta filmo: Longa majesta fasado de la iama Reĝa Palaco; jen ankaŭ la severa sed plaĉa konstruaĵo de la Urbodomo, en antikva tipa strateto, apud la ampleksa kvadrato de la *Plaza Mayor* (Ĉefa Placo) kies ĉirkaŭanta portiko statuoj, honore al alia pli proksima reĝo: Alfonzo, la XII^a^. Certe, tiel bela loko meritas halton, kiun ĉiuj profitas por plaĉe piedumi kaj diligente uzi la fotografilojn.

Sekvis la veturo, laŭlonge de unuaklasa ŝoseo al flughaveno *Barajas*, ĉe kies proksimeco oni returne venis tra kvartalo, nomata de la amerikanoj, kaj *Ciudad Lineal* (Linia Urbo), kie troviĝas gravaj instalaĵoj kaj laborejoj por kinematografa industrio. La longa promenejo *Castellana* montras la trajtojn de sia aristokrateco same kiel, en apudaj flankoj, la sveltajn masonaĵojn --ankoraŭ en prilaboro-- de la novaj ministrejoj. Subite, jen antaŭ niaj okuloj la kolosa stadiumo Metropoliteno aŭ *Santiago Bernabeu*, kiu, kredeble, estas la plej granda sportejo en Eŭropo. Sufiĉe proksime, la elegantaj pavilonoj de la Universitata Urbo avertas pri adekvata ekvilibro inter la fizika kulturo kaj tiu alia por la intelekto, por la spirito... Nova kvartalo *Puerta de Hierro*, laŭ gracia nomdonanta portalo kun fera pordo, kaj la tre populara arbaro *Moncloa* signifas ja, ke alproksimiĝas la fino de nia neforgesebla promenado.

Nur kelkajn kilometrojn ankoraŭ tra avenuoj, kaj... la aŭtobusaj radoj, laŭ takto de bremsa knaro, stampas kaŭĉukan subskribon, sur la plankon de la bela placo Hispanio, definitive haltante por atesti, ke, plej kontentige la promenado ĵus okazis.

***Amike brua akcepto; granda amaso da homoj; bonaj samideanaj rilatoj; interesa scienca programo... Jen do granda sukceso por la Kongreso en Madrido!***

H. MABESOONE — Profesoro en la Universitato de Leiden (Nederlando)

fermas la spacon, kiu, antaŭ jarcentoj, estis areno por turniroj, taŭroludoj kaj aŭtodafeoj... Kiel memoraĵo, dika piedestalo eltenas statuon el bronzo de la reĝo Filipo, la III^a^, rajde sur baŭmanta ĉevalo. Preter la Ministrejo por Eksterlandaj aferoj kaj la Pordego de Toledo, tra labirinto da malnovstilaj stratoj, oni venas al la relative moderna kaj larĝa promenejo de l' *Prado* (Herbejo), kiu kondukas al la vasta malfermaĵo de la parko de l' *Retiro*, kun grandega baseno, en formo de lago, sur kies kvieta akvo respeguliĝas la duonronda balustrado de monumento, kun multaj

Ĉar libera tempo, por tagmanĝo kaj siesto, oni facile disiĝas, ĉiu al sia nesto, ĝis laŭvica renkontiĝo en la Akceptejo, akurate je la sepa posttagmeze, por la

### INTERKONATIĜA KUNVENO

«Centro Asturiano» estas regiona klubo, kiun la asturanoj loĝantaj en Madrido posedas en strato Arenal, je kelkaj paŝoj de la *Puerta del Sol.* Luksa ejo ĝi estas, ĉar grafa palaco ĝi estis! Dank' al la persona influo de S-ro Alfredo Villa, animo de nia 16^a^ Kongreso en Gijón, la nunjaraj organizintoj povis uzi, kiel

Akceptejon, la riĉajn salonojn de nobela domo, kiu ŝajnis abelujo jam multe antaŭ ol la anoncita horo. De la ŝtuparo, kun valoraj tapiŝoj, ĝis la halo, kun artaj freskoj, tra vestiblo kaj bufedo, ŝvebis en aero muzika kunfandiĝo —plej karakterize nia!— de sonoj kaj resonoj diverstonaj el salutoj kaj resalutoj, garnitaj de sonoraj klakoj pro karesa ekfrapo de manoj ĉirkaŭe sur dorsojn de malnovaj konatoj nove ĵus venintaj... La vorto *samideaneco* estas io!

Ankaŭ mi, kompreneble, estis fajrero en la ĝenerala brulo, ĉar karaj amikoj, fratoj kun pensoj kaj sentoj egalaj, kun ĝojaj mienoj kaj brakoj malfermaj renkonte al mi venis: Jes, akademiano Delfí Dalmau, la kataluna pioniro, kiun de longe mi ne vidis; S-ro L. Otaola, la maltima kapitano de nia brava kohorto en Bilbao; S-ro Adolfo Nunes, la konstanta delegito de la portugalaj samideanoj; S-ro J. Ezquerra, estro de la Nacia Blindula Organizo; respektinda Pastro J. Casanova; S-roj Solá, Gumá, Gisbert, Padráo plus aliaj kaj aliaj... Tajdo altiĝas, en senĉesa ondado; kreskas la nombro da alvenintoj kaj, sekve, akumuliĝas la zorgoj por la komitatanoj, kiuj distribuas la kongresmaterialon, atentas petojn aŭ sentikligas tiklaĵojn... sen tempo apenaŭ por viŝi el siaj fruntoj abundajn gutojn de ŝvito, kiel simbolajn perlojn de meritita premio. Similan staton *ĝuas* la nelacigebla Prezidanto de la Federacio, D-ro R. Herrero, loga kaptaĵo kaj eĉ ofta viktimo de scivolaj ĵurnalistoj, kiuj, tie kaj aliie superŝutas lin per demandoj, ne ĉiam facile respondeblaj, por intervjuoj kaj raportoj aperontaj en gravaj gazetoj.

La bela disketo de la insigno, pendanta de verda silka rubando, kvazaŭ ekfloras de sur la brustoj, kiel montrinda ornamaĵo kaj valora rajtigilo por pluraj prerogativoj, kiujn la kongresaneco ebligos. Unua el la serio, kiu sekvos, estas senpaga frandado de likvoroj kaj kukoj, laŭ ĝentila invito de la gastiganta societo, ĉe abunde provizita bufedo, kie, pro tio, en plej bona rekordo, laŭdoj kaj tostoj sin intermiksas al salutoj kaj babiloj, dum la gravuloj —ho, kia avantaĝo tiu de la sengraveco!— aliloke baraktas ankoraŭ en la retoj de intervjuoj; demarŝoj, klopodoj... La tempo pasis nerimarkite, fariĝis vespero en fluso kaj malfluso de iroj kaj reiroj. Preskaŭ jam noktomezo, en la Salono de la Speguloj, okazis la anoncita koncerto de la orkestro de kordaj instrumentoj, de la Estraro de la Nacia Blindula Organizo, sub la gvido de direktoro, S-ro Rafael Rodríguez Albert; oni aŭskultis tre plezure kaj oni varme aplaŭdis la elektitajn pecojn, kiujn ege perfekte ludis la blindaj muzikistoj.

Dum paŭzo oni legis salutojn --kelkaj el ili eĉ en versoj!-- kaj oni *devigis* D-ron Herrero eksteroficiale elverŝi, en agrabla bonveniga paroladeto, iom el lia akumulita elokventeco. Tiel finiĝis la programo de la unua tago, kiu fakte estis nur preparo. Ree okazas disiĝo en ĉiujn direktojn. En fasadoj grimacas lumaj anoncoj; pli supre, en nigreblua ĉielo, trembrilas miliardoj da steloj, ŝajne reciprokante —kial ne kredi tion?— la metalajn reflektojn de tiu alia stelo, kiun surbruste la kongresanoj portas por altigi la sentojn, eĉ en tiu momento, kiam pensoj celas ripozon.

## MERKREDE — 24. JULIO

Ĉiu tagiĝo estas burĝono de esperoj kaj revoj, kvankam ordinare plej multaj tagoj restas kiel senskribaj folioj, en la albumo de la vivo. Sed, dum Esperanto-Kongreso, oni tiel intense vivas, ke oni nek minutojn perdas. Tial, tuj post matenmanĝo, la kongresanoj scias, ke, laŭ plenumenda tagordo, unua punkto estas

### VIZITO AL LA PRADO - MUZEO

En aleo de la parko-promenejo Prado, de kiu ĝi ricevas nomon, kuŝas novklasika konstruaĵo por unu el la plej gravaj muzeoj en la mondo. Antaŭ ĝia ĉefa enirejo, kolektiĝis la kongresanaro, kiu devis disdividiĝi en grupojn por eniri laŭvice, tute senpage, montrante la insignon. Kiel respondeca gvidanto, la unua el ĉiu grupo subskribis en libro. Jam interne, altaj plenlumaj ĉambregoj sinsekvas, donante impreson de harmonia senfineco. La tuta kolekto estas admirinda trezoro, kun famaj verkoj de eminentaj eksterlandaj majstroj: Rubens, Van Dick, Tiziano k. t. p. apud nomoj pli intimaj: Velázquez, la monduma kortegano; Murillo, la delikata dorlotanto;

Greco, la mistika genio, kun propraj normoj kaj konceptoj pri koloroj aŭ formoj, same kiel Goya, la epikura koloso de la hispana pentrarto, fekunda kreanto de verkoj, en kiuj la popolo trajtas ne nur en ĉarmaj kutimaj scenoj, sed en seriozaj portretoj de princoj kaj reĝoj, aŭ en tiu tutmonde fama de *La Maja Desnuda*, en kiu absolute nuda belulino, sur molaj kusenoj, kun puntaj falbaloj, tre incite deklaras, ke ŝi estas hispanino... Kelkaj samideanoj kompetente rolis kiel ĉiĉeronoj, farante utilajn klarigojn pri la plej rimarkindaj verkoj. Mi ankaŭ iom klarigis pri la admirinda skulptaĵo nomata *La Dama de Elche*, bela kapo de virino, kies komplikitaj ornamaĵoj estas ege valora dokumento pri la alta civilizo, kiu pratempe ekzistis, oriente de la lando, en epoko de la iberoj, la unuaj loĝantoj.

Elirinte de tiu templo de la arto, kun retinoj saturitaj de beleco, la samideanaro devis paŝi nur kelkajn metrojn, transire al fronta modernista konstruaĵo de la Sindikata Domo --rektangula vertikala bloko, simetrie truita de 180 kvadrataj fenestroj-- kiu, kiel oportuna Kongresejo, jam atendas nin por la formalaĵoj de la

**SOLENA MALFERMO**

Alta enirejo antaŭas la spacon de ampleksa vestiblo. Flanke, en videbla loko, longa tablo kun libroj, el la stoko de Libro-Servo, invitas al aĉetado; tie deĵoras nia samideano el la Valencia rondo, F. Estruch, tiel fervora --tiel admirinde fervora!-- ke eĉ kun gipsa kiraso, pro ĵusa operacio ĉe la spino, li veturis al Madrido por aktive labori; kaj vere, li ne havis okazon por ripozo, ĉar precipe en tiu momento la mendoj kaj vendoj brilis en sia apogeo. Fakte, la vestiblo estas antaŭaĵo de la granda halo aŭ festsalono kun partero, kies komfortajn fotelojn jam plenokupis la tuta kongresanaro, kiam en la impona podio el griza marmoro aperas la prezidantaro. La ŝatataj figuroj de niaj gvidantoj nete konturiĝas sur dekoracia fono kun atributoj, emblemoj kaj flagoj.

Meze de profunda silento. S-ro Angel Figuerola bonvenigas la ĉeestantojn. Je nomo de la Organiza Komitato, laŭte li emfazas la signifon de nia idealo, kiu, en la angoraj skuoj de la nuna tempo, reprezentas la esencon de la plej noblaj aspiroj de l' homoj. Li vidas, ke la penoj de la organizintoj ne estis vanaj, ĉar de preskaŭ ĉiuj geografiaj punktoj de la lando venis esperantistoj por amike renkontiĝi kaj publike montri sian ekziston. Kiam cesis la aplaŭdoj, kiuj sigelis liajn vortojn, S-ro Dario Rodríguez, la agema sekretario, montris amason da leteroj kaj telegramoj, kun salutoj aŭ gratuloj de apartaj samideanoj kaj asocioj, kies nomoj ĉe legado ricevis la premion de forta manklakado. Tuj poste venis vico por la personaj alparoloj de diverslandaj kongresanoj, kiuj per sinceraj kaj emociaj vortoj signis la tutmondecon de nia Movado: simpatia juna seminariano P. Reineiro, el la malproksima insulo Kubo; franca instruisto D. Luez; itala *madridano* J. B. Bernardis; nederlanda profesoro H. Mabesoone kaj la portugala kamarado Adolfo Nunes; ili estis honora prologo por la enlandaj salutantoj, kiuj sekvis, post interveno de S-ro F. de la Puente, el Zaragozo, nome de K. E. H. A. (Katolika Esperantista Hispana Asocio) kun afablaj bondeziroj. Neniam antaŭe, en la pasintjaraj kongresoj, estis tiel komplete reprezentataj ĉiuj hispanaj regionoj. Jes, la altira voko de la Centro ricevis respondon de Nordo kaj Sudo, de Okcidento kaj Oriento, eĉ de la malproksima Kanaria Arkipelago, en frata efektiva unueco. Por tion atesti, pli malpli konataj samideanoj, pli malpli famaj, sed egale plenrajtaj, laŭvice invitataj de la Sekretario, staras por paroli balbute aŭ elokvente --tio ja ne gravas!-- vive plektante bukedon da vortoj, omaĝe al la pasia etoso, kiu en la salono regas.

Kaj nun, kiel sorĉisto scianta kapti la eĥojn kaj vibrojn de ĉiuj diritaj salutoj, D-ro Herrero, nia kara nacia Prezidanto, kun sia malicete ridema mieno, faras resumon per klara trafe konciza diskurso:

Li ĝojas, ke rekte kaj senpere li povas sin turni al samideanoj el ĉiuj hispanaj regionoj kaj el pluraj eksteraj nacioj, kiuj, kiel membroj de unu sama familio, rendevuis en la granda komuna festo, ĉar nur per tia publika agado, ni konvinkigos

# En la kadro de sia beleco, Madrido donis atento[



**D-ro R. Herrero**
dum sia malferma diskurso.

la skeptikulojn. Krome, ni ankaŭ kunvenas por trovi solvon al niaj propraj aferoj, studi la manieron apliki niajn principojn kaj ebligi al ili oportunajn cirkonstancojn. En la nacia tereno, du pozitivaj atingaĵoj elstaras: la eldono de la Hispana-Esperanta Vortaro, kaj la funkciado de Esperanto-Kurso en la Valencia Universitato; pri la unua fakto estu dirite, ke multjara revata deziro jam efektiviĝis dank' al la kompetenteco de D-ro E. Tudela kaj al la financa helpo de kelkaj oferemaj amikoj. Espereble, rapida disvendado de la verko stimulos la aŭtoron kaj la financintojn por aliaj utilaj entreprenoj. La dua atingaĵo devas instigi ĉiujn, kiuj iel povas influadi ĉe universitataj instancoj, klopodi por enkonduki la Internacian Lingvon en multaj hispanaj fakultatoj, kiel jam io tia okazis en la Medicina Fakultato de Valencio, ankaŭ pro la ege valora interveno kaj efektiva agado de D-ro E. Tudela. Tiuj faktoj estas vere esperigaj; ili donas al ni pliajn fortojn por ne ĉesi en nia strebado, cele al la progreso de nia Movado, por la bono de la homaro, por la feliĉo de ĉiuj. La disvolviĝo de Esperanto, en la diversaj landoj, okazas dank' al persisto de bonkoruloj. Nu, ĉi tie, en la lando de Don-Kiĥoto, ni densigu la vicojn en senhalta laborado, kio liveros cetere multajn spiritajn plezurojn. Nia kongreso estu ekzemplo pri tio, ni provu, ke ni scias labori kaj festi; kun renovigitaj energioj, de jaro al jaro, ni iru nian vojon ĝis la venko.

Kvietigitaj la animoj, post la tondroj de l' aplaŭdoj, la strofoj de «La Espero» respektoplene kantataj digne fermas la solenaĵon, kiu povas riski komparon kun la brilo de la suno; tiu suno mem, kiu en la zenito lumigas stratojn kaj placojn, sur kies trotuaroj la kongresanoj rapidas al tagmanĝo por... «renovigi siajn energiojn», kiuj estos necesaj post tri horoj por la ĝeneralaj taskoj, en amika diskutado, de

**FAKKUNSIDOJ KAJ INTERNA KUNVENO**

Je oportuna horo, en diversaj laborĉambroj de la Sindikata Domo, granda nombro da kongresanoj kunsidis laŭ apartaj branĉoj aŭ fakoj. Liftoj portis supren la interesatojn, kiuj plivigligis la koridorojn en kelkaj etaĝoj, serĉante la kunvenejon de sia koncerna specialaĵo.

Rimarkinde interesa estis la interna kunveno de grupdelegitoj kaj respondeculoj al kies konsidero, kvazaŭ en reduktita ĝenerala kunsido, la Estraro de la Federacio submetis plej gravajn solvendajn aferojn, pri kiuj oni devis provizore decidi, ĝis definitiva juĝo aprobos aŭ malaprobos en la kongresa laborkunsido. En intima atmosfero, oni povis diskuti kaj studi sugestojn kaj opiniojn en rilato kun la problemoj, kiujn nia organizo devas alfronti. Kiel kutime, la financoj baras kaj ĝenas la regulan marŝon; la kreskanta plialtiĝo de la preskostoj devigas nepre elekti --uzante frazon de la oficiala raporto-- unu el la jenaj du rimedoj: *plialtigi la enspezojn aŭ redukti la elspezojn!* Jen dilemo! Sekvis interesa debato, kun objektiva ofereca sinteno. Kelkaj proponoj meritis specialan atenton; fine oni venis al la konkludo, ke ne estus prudente altigi la kotizon laŭ la procento, kiun la regula ĉiumonata aperado de BOLETIN postulas. Tial, kun ĉagreno, sed ankaŭ kun kuraĝa decidemo, kiun mi mem iniciatis, oni akceptis la radikalan proponon, ke la bulteno, post la eksterordinara kongresa numero --ĉi tiu, kiun vi, kara leganto, nun legas!-- aperu dumonate kun nur ok paĝoj, ĝis kompleta resaniĝo de niaj financoj. S-ro E. Hurtado, je nomo de la Administracio, rimarkigis la dankindajn monhelpojn de pluraj oferemaj amikoj --veraj aktivistoj-- kiuj tamen ne sufiĉas por ŝtopi, la breĉojn. Cetere, oni nur konas la valoron de io, kiam ĝi mankas; espereble, la monata paŭzo, kiun BOLETIN de nun faros, vekos ĉe multaj abonantoj la emon ĝin apogi senrezerve.

Alia temo --malnova temo-- estis tiu

pri la sidejo de la Federacio; laŭ akceptita principo, Valencio estas preta --eĉ tion ĝi forte deziras-- transdoni la postenon al Madrido, sed la ĉeestantaj madridanoj detale argumentis, ke ili ne troviĝas en situacio preni tiun honoran taskon. Nu, Valencio akceptas ***kiel devon*** --oni atentu bone pri tio!-- daŭrigi la gvidadon de la hispana esperantismo, ĝis iu kompetenta rondo faros la koncernan peton. Fine, oni priparolis la elekton de urbo por la venontjara kongreso; ankaŭ tio okazigis longetan diskutadon; oni menciis kelkajn nomojn: Santander, Valladolid, Tarragona, Alicante, Castellón; eĉ La Laguna, en la Kanariaj Insuloj... Oni konsideris tro riske fari jam definitivan elekton; tial, oni lasis tiun komision al la Estraro, kiu decidos post esploro de la lokaj cirkonstancoj, ĉiam interkonsente kun la samideanoj en la respektivaj urboj. Jen do ĉio!

Sed, kvankam finiĝis laborplena kunveno, la horloĝo avertas, ke ankoraŭ vicas aliaj zorgoj. Ili apartenas nun al la

### EKZAMENOJ DE ESPERANTO

Kun du akademianoj: S-roj D. Dalmau kaj J. Régulo Pérez, mi rolas kiel sekretario de tribunalo, kiu, en izolita ĉambro, ***severe*** frontas al nombro da aspirantoj por la diplomoj pri Kapableco kaj Instruiteco. Mi diktis ekzercojn, en kiuj troviĝis, ***ruze*** distribuitaj en la teksto, pli malpli ordinaraj tiklaĵoj pri la akuzativo, refleksivo, posesivo k. t. p. Unu post alia, la ekzamenatoj finis siajn taskojn; mi ricevis kaj gardis la kajerojn, kiujn la tribunalo studos kaj juĝos. La juĝo estos solene prezentata venontdimanĉe, dum la Literatura Festo.

Kaj... almenaŭ por unu el la tri juĝantoj, ankoraŭ ne finiĝis la laboro, ĉar estas preskaŭ jam la horo por la anoncita

### PRELEGO DE PROF. DELFI DALMAU

La liftoj nun, serve al ni, funkcias inverse, supre-malsupren. En la festsalono multenombra publiko atendas. La bela marmora podio fariĝas denove tribuno, kiam Prof. D. Dalmau komencas paroli per sia karakteriza milde sonora voĉo. Li parolas hispanlingve; kaj ĝuste ĉi tiu sola escepto plej nete konfirmas la regulon, ke, en la hispanaj Esperanto-Kongresoj, oni nur uzas la lingvon Esperanto; sed, hodiaŭ, la disertacio ***¿Por qué es fácil el Esperanto?*** (Kial Esperanto estas facila?) celas la neesperantistojn. En lerte ordigitaj periodoj, preskaŭ sen helpo de notoj, S-ro Dalmau prezentis kuriozajn ekzemplojn pri la supraĵa kaj tamen profunda unueco ekzistanta en la okcidentaj lingvoj. Li faris komparojn inter Esperanto kaj la angla lingvo, por montri la superecon de nia lingvo, rilate klarecon kaj facilecon, por praktika internacia uzo, kun maksimuma fideleco al la ĉefaj naturaj elementoj, ĉar Zamenhof en sia verko sentis identecon kun Einstein, tial ke ili ambaŭ pruvis internan unuecon en siaj respektivaj fakoj.

Varmaj aplaŭdoj donis premion al lia erudicio kaj metis finon al la densa programo de la dua tago. Ĉar oni disponis je la tuta vespero por libervola uzo, ĉiu kongresinsigno indikis la preferojn de sia posedanto, laŭ la medio, kiu ĝin envolvis: malhumo de kinejo, planko de kafejo, nokta lumo de la urbo aŭ tiu alia pli simpla de frua kuŝado en lito de hotelo.

## ĴAŬDE — 25. JULIO

Festotago de Sankta Jakobo, la rajdobrava apostolo, patrono de Hispanio. Plaĉa kvieteco, regas en la tuta urbego, ĉar la trafiko estas modera, kiel decas al mateno en kiu, anstataŭ labori, oni povas volupte dormi. Sed, por la kongresanoj ekzistas kodo --la programo!-- kiu asignas okupojn por ĉiuj tagoj senescepte. Akorde kun la hodiaŭa dato, plenuminda devo estas

### LA SANKTA MESO

Dika kupolo, inter du turoj sur kurba tegmento, kronas la novklasikan konstruaĵon de la preĝejo Sankta Francisko, la Granda, kien respektoplene la unuaj kongresanoj eniras. La ore-bruna tono de la interno, severa kaj eleganta samtempe, grandioze kulminas en la alta harmonio de centra volbo, kies vitraloj filtras lumradiojn, falintaj ege delikate, kvazaŭ ĉiela kareso, sur la esperantistojn, kiuj genuflekse partoprenas la religian solenaĵon, dum nia respektinda S-ano Pastro J. Casanova, en la predikejo, edife

Kiam per modestaj rimedoj, strebante al noblaj celoj, oni atingas superan etapon, ekzistas motivo por prave laŭtigi aklamon al propra kontento. Tion ni faras hodiaŭ por petole anonci, en la preciza loko, surkape de serioza teksto, ke la plena kolekto de BOLETIN, nia federacia ligilo, jam rajtas fanfaroni pri mil aperintaj paĝoj...

avertas en klara Esperanto, ke ne facile povas regi konkordo kaj amo --pura esenco de la kristanismo-- inter la diversgenta homaro, sen la bonfara servo de komuna lingvo. Kaj, lia velura voĉo, en tiu lingvo mem, kiun li predikas, ŝvebas kiel esperiga profetaĵo en la vasta spaco de la vastaj navoj... Mallonga hispanlingva resumo ebligis komprenon pri la prediko kaj Esperanto al la neesperantista publiko.

Jam denove ekstere, ni havis okazon vidi *eksterprograme* la paradon de kelkaj eskadronoj el la garnizono, kies oficistaro iris al pompa diservo, en la sama preĝejo, honore al la sankta apostolo Jakobo, ankaŭ patrono de la hispana Kavalerio.

Promenante en apartaj grupoj, kiuj iel konsistigis erojn el gaja manifestacio, oni venis al proksima atendejo por la

**VIZITO AL LA PALACO DE ORIENTO**

Ĉar ĝi situas fronte al ĝardeno Oriento, tiel estas populare nomata la iama Reĝa Palaco, oficiala restadejo de la hispanaj monarkoj, dum la du lastaj jarcentoj. Kiel *magia* ŝlosilo, la kongresinsigno ebligas facilan kaj --precipe-- senpagan eniron en la reĝan domon. De la honora marmora ŝtuparo, en la vestiblo, ĝis la elireja korto, lukso kaj arto rendevuis por doni rangon de majesteco al la loĝejo de la reĝaj familioj. Salonoj antaŭas salonojn, haloj sekvas halojn; ju pli ĉarmas unu, des pli logas alia. Pro akumuliĝinta trezoro en la interna dekoracio: plafonoj, lustroj, mebloj, tapiŝoj, pentraĵoj, statuetoj, porcelanoj, vitroj, horloĝoj, miniaturoj k.t.p. la fantazio elvokas korteganajn scenojn: menuetoj kaj valsoj, sur poluritaj plankoj, aŭ mistera melodio de kisoj, inter faldoj de kurtenoj, kiuj certe tiel same aŭdis ĵurojn de amo, kiel flustrojn de intrigoj kaj konspiroj... Supera simbolo de la tuta palaco estas tiu impona salono, kie la trono, inter du oraj leonoj, atestas pri majesta potenco kaj gloro, sed ofte ankaŭ ne sen akompano de zorgoj, respondecoj kaj ĉagrenoj.

Sub tia impreso finiĝis la vizito; la samideanaro tretas nun surstrate vulgaran asfalton, en trankvila promeno kun adekvataj haltoj por *saluti* aperitivon, antaŭ ol *komplimenti* tagmanĝon. Bonan apetiton! Longa paŭzo estas je ĉies dispono ĝis matureco de duona posttagmezo por la

**VIZITO AL SCIENCAJ INSTITUCIOJ**

La Supera Konsilantaro por Sciencaj Esploroj estas moderna institucio kun diversaj fakoj, inter ili du fondaĵoj speciale interesaj por ni: Patronato Juan de la Cierva kaj Instituto Torres Quevedo, ĉar ili portas la nomojn de du eminentaj hispanaj esperantistoj, kiuj donis prestiĝon al nia Movado, antaŭ kvardek jaroj, en plej kleraj medioj. Kiel pia omaĝo al ilia memoro, la kongresanoj vizitis la instalaĵojn de tiuj sanktejoj de la sienco, en trankvila iom fora kvartalo, atente aŭskultante detalajn klarigojn pri la funkciado kaj manipulado de tre delikataj aparatoj.

Tio estis bona preparo antaŭ la

**PRELEGO DE PROF. J. RÉGULO PÉREZ**

Najbare montriĝas la ampleksa fasado de brike masonita domo, sidejo de la gvida konsilantaro por la tuta institucio. En ĝia luksa amfiteatro, ĉiuj sidas kun fiksaj rigardoj al la estrado, kie staras nia kanaria akademiano, kun preta staplo da plenskribitaj folioj ĉe la mano. Post laŭdaj prezentovortoj de D-ro Herrero, sen alia ceremonio, S-ro J. Régulo, per sia milda voĉo, iomete nuancigita de tropika prononco, atakas la temon de kuraĝa prelego:

«Nuna stato de la problemo pri la Internacia Lingvo».

***La preleganto komencas per aludo al la fakto, ke ĝuste 70 jarojn antaŭ ĉi tiu momento aperis en Varsovio modesta broŝuro, kiu portis la titolon* LINGVO INTERNACIA. *Tiu maldika modesta broŝuro --sed verko de geniulo!-- estas la prakaŭzo de samideana renkontiĝo en la 18ª Hispana Kongreso de Esperanto; sekve li analizas la rolon de la tekniko, de la socia progreso kaj de la enveno de Oriento en la mondan politikon.***

*kio kunfluis al estiĝo de kultura pejzaĝo tre simila al tiu de la Mezepoko, precipe en la interrilatoj. Li studas la sintenon de partoprenantoj en internaciaj kunvenoj en kiuj akutiĝas prestiĝaj demandoj, oportunismo, nacia fiero k. t. p. Laŭ tio, estas unu sola eblo por solvi la problemon: enkonduki neŭtralan lingvon, kiu jam funkcias: Esperanto! Sed, kontraŭ ĝia rekono leviĝas grandaj obstakloj: rutina kredo, nescio pri la ekzisto kaj poveblo de Esperanto, lukto por nacia influo en internaciaj rondoj k. t. p. Antaŭ tio, neniel ni devas subtaksi la decidon en Montevideo nek la fakton, ke* UNESKO *nuntempe eldonas afiŝojn en nia lingvo; sed, se ni volas nepre akceli la agnoskon de Esperanto, ni trabatu al ni vojon al sciencaj rondoj, per kreo de taŭga lingvistika literaturo kaj per fortikigo de ĉiuj niaj organizaĵoj. Li finas dirante, ke la tasko de la esperantismo estas gvidi al memstara pensado, kun forlaso de kadukiĝintaj emociaj faktoroj, ĉar ni estas pioniroj de nova orepoko en la historio pri la progreso de la homaj spiritaj atingoj.*

La lekcio estis streĉe aŭskultata kaj, kredeble, bone komprenata. Multaj manoj ĵus aplaŭdintaj prenis tiujn de Prof. Régulo, en sinceraj gratuloj. Ĉe la rando de l' vesperiĝo estis agrabla la libera aero La fortikaj kolonoj de proksima fasado donis fonon por kolektiva fotografado, antaŭ ol venis disiĝo laŭ apartaj vojoj, kiuj poste koincidos en privataj renkontiĝoj.

Pozitive ni celebris la festotagon!...

## VENDREDE — 26. JULIO

Sed, festotago simple antaŭas labortagon... Kaj laboron oni pruvas per laboro. Fidelaj al tiu aksiomo, la laboremaj samideanoj ĝustatempe troviĝis en la kongresejo por vigle interveni en la debatojn de

### LA LABORKUNSIDO

Ĉi-foje, kune kun la Estraro, mi sidas kiel raportanto en la marmora podio. D-ro Herrero malfermas la kunsidon kaj invitas elekti prezidanton kaj protokolanton. Estas respektive elektataj S-ro M. Solá --nia estimata S-ro Solá-- el Tarrasa, kaj la juna diligentulo S-ro R. Ayala, el Barcelono. Tuj post tio, regas la tagordo. Laŭte mi legas la raporton, kiu aperis en la Julia numero. En la periodo pri la Bulteno mi aldonas kaj legas propran kompilon, kies preskaŭ kompleta teksto estas jena:

«KARAJ GEAMIKOJ: Kutimo fariĝas leĝo; kaj sana leĝo estas la kutimo persone raporti kaj detale informi pri la redaktado de nia kara BOLETIN. Tial, kiel ĝia respondeca kuratoro, mi ĝojas povi nun denove stari antaŭ vi, por submeti al via konsidero la gvidlinion, kiun mi aplikas por flegi la korpon kaj orienti la spiriton de nia oficiala organo, cele al ĝia plej bona vartado.

Post trijara plene kontentiga redaktoreco, S-ro J. Bosch petis eksiĝon, por lasi la postenon ĉe la fino de pasinta jaro. Tiam, kvazaŭ daŭrigante mian antaŭan kvinjaran deĵoron, mi reprenis --pli malpli provizore-- la zorgojn de ĝia plenumo. Oni proverbe diras, ke estas propra listo por ĉiu instruisto; akorde kun tio, la gvidado de nia gazeto suferis ian ŝanĝon, ricevinte similan aranĝon kaj saman aspekton, kiun antaŭe ĝi havis. Kompreneble, tio neniel signifas malŝaton por la meritoplena laboro de la anstataŭita kolego, sed nur, kiel dirite, konsekvenca ago por apliki mian propran sistemon. Sekve, per aldono de kelkaj vinjetoj sub la prezido de videbla titolo, kun nova desegno kaj varia koloro por ĉiu trimonato, nia bulteno iĝis iom malsama el pure tipografia vidpunkto. Krom tio, mi klopodas, ke la diversaj artikoloj estu ordinare lokitaj, interne de la limoj de siaj respektivaj paĝoj.

Grava ŝanĝo estis tiu forigi la krucvortenigmojn, por povi okupi ilian spacon per diversaĵoj en la kadro de kompleta paĝo. Bedaŭrinde, tiaj krucitaj vortoj pro siaj ampleksaj solvoj bezonis preskaŭ la tutan paĝon, kun evidenta domaĝo



**Luis Hernandez**
salutparolas en la Malfermo apud S-ro Dario Rodríguez

por ceteraj interesaĵoj, kiujn, kredeble, ŝatas multaj legantoj. Mi volas tamen deklari, ke venis konkretaj plendoj --du aŭ tri-- pro la subita malapero de tiuj enigmoj. La argumento, ke ili taŭgas por ekzerci la memoron kaj trovi vortojn, estas konvinkiga, ĉar tute vera, sed ankaŭ vero, ke nur ege malgranda rondo atentis kaj sekvis tiun rubrikon. Ankaŭ ne plaĉis al kelkaj amikoj la forigo de la sekcio «Lernu tradukante!» kiun mi mem estigis en mia unua periodo, sed ĝi estas anstataŭita de jam konata simila rubriketo: «Interlingva Paralelo». Estus bone serĉi la manieron eldoni apartan folion kun dense ŝtopita kruevortenigmo kaj cerbumiga tradukenda tasko. Sed, tute certe, la rigora baro de la financoj malebligos, almenaŭ nun, la efektivigon de tiu deziro pro la drastaj reduktoj, kiujn bedaŭrinde nia revuo devos baldaŭ suferi. Tamen, certe tiuj reduktoj daŭros nur ĝis la cirkonstancoj normaliĝos; sed, la deviga reduktiĝo povas havi eĉ pozitivan rezultaton --ne estas malbono sen bono!-- ke la enhavo estos pli koncentrigita, ĉar plej bona esenco troviĝas en malgranda flakono. Por plivalorigi la enhavon, mi petas al vi sendi fragmentojn el viaj eksterlandaj leteroj kun priskriboj de la vivo kaj moroj de malproksimaj popoloj. Ankaŭ estos bonvenaj artikoloj pri la profesio aŭ metio, en kiu ĉiu el vi laboras.

Mi prezentas, kiel modelojn, la raporton pri la «Sauna» en Finnlando kaj tiun pri la draŝado de tritiko, en la Maja numero. Kompreneble, ĉar temas pri asocia organo, daŭros informoj kaj sciigoj, pri la vivo de la grupoj, en la sekcio «Hispana Kroniko», kiu estas kvazaŭ la pulso por eksterigi la signojn, ke ni vivas kun viglaj elastaj muskoloj, pretaj por decidaj saltoj al tute favoraj pozicioj, kiuj ebligos ne nur memori pri tiuj mil jam aperintaj paĝoj, sed garantii la aperon de la dua milo ankoraŭ pli frue».

Kun vera intereso, sen plej eta elmontro de enuo, oni atentis la legadon de ĉi tiu kaj ceteraj raportoj. Ĉe la fino, mi prezentis al la ĝenerala konsidero la decidojn de la interna kunveno de grupdelegitoj. Speciale mi klarigis la punktojn, ke la kotizo restos la sama por la venonta jaro, sed la bulteno fariĝos dumonata kaj nur okpaĝa. Kompreneble, estis diversaj intervenoj ne favoraj al tio, sed antaŭ la pezaj argumentoj prezentitaj, oni aprobis la redukton kaj la raporton de la Estraro. S-ro Molera informis pri la sukcesa disvolviĝo de la Kursoj per Korespondado. D-ro Herrero insistis pri la neceso enkonduki Esperanton en ĉiujn klerigejojn: lernejoj, institutoj, fakultatoj kaj universitatoj.

Interesajn sugestojn oni faras en la lasta parto, dediĉita al la ĝeneralaj aferoj. S-ro Otaola proponas peti oficiale al la Poŝta Direkcio la eldonon de poŝtkartoj kaj poŝtmarkoj en Esperanto. S-ro Solá deziras, ke en la konkludoj oni petu al la Turisma Ministrejo la eldonon de broŝuroj kaj prospektoj. S-ro Gumá pledas por ke oni ĉesu labori individue, sed en ordigita plano, dividante la taskojn en diversajn fakojn. D-ro Herrero akceptas la ideon kaj proponas, ke, por ĝin efektivigi, la ĵus fondita Instituto de Esperanto, en Barcelono, reprenu la taskojn de la Kunordiga Servo. S-ro Gisbert, nome de tiu nova organizo, akceptas la sugeston kaj akcentas la meritojn de Pastro A. Sinues, prezidanto de tiu Instituto. Pri la okazigo de Universala Kongreso en nia lando, eble en 1960, S-ro Dalmau, diras, ke ne ekzistas kondiĉo, por ke ĝi nepre okazu en Barcelono, sed ankaŭ en iu ajn grava hispana urbo; pri tio U. E. A. findecidos. Pli urĝa demando estas nun serĉi urbon por nia venontjara rendevuo. D-ro Herrero promesas kontentigan elekton.

Laŭ propono de S-ro Solá, oni decidas fari omaĝon memore al la fama pioniro D-ro Cortezo, per surmeto de florkrono ĉe lia monumento. Fine, kiel tradicia ĝentila kutimo, oni decidas sendi saluttelegramojn al la Ŝtatestro kaj al la Urbestro de Barcelono, krom al pluraj aliaj aŭtoritatuloj, kiuj favoris kaj helpis la aranĝon de la nunjara renkontiĝo. Finiĝis la longa debato, ĉesis la diskutoj, sed ankoraŭ la voĉoj en bona agordo laŭtigas la strofojn de «La Espero» firme kredante, ke nepre «dissaltos la obstinaj baroj»... Oni kviete forlasas la salonon. Somera varmego blovas ekstere; sed... varmo estas vivo kaj rekta instigo por bano kaj duŝo, ĝis posttagmezaj aranĝoj.

★

### OFICIALA KOLEKTIVA FOTOGRAFADO

Du horojn poste, okazis kolektiĝo sur la perono kondukanta al la triporda enirejo de la Nacia Biblioteko; apud piedestaloj kun ŝtonaj statuoj, la kongresanoj ŝatis roli kiel figurantoj, en anonima amaso, por la oficiala bildo de la nunjara renkontiĝo. De tie, laŭ ĵus ricevita invito, oni piediris al konata adreso, por interesa afero:

### VIZITO AL LA ĴURNALO «A B C»

Ĝi estas unu el la plej gravaj tutlandaj ĵurnaloj; malgraŭ tio, ĝi havas malfermaj la pordojn de sia luksa domego al la kolektivoj de kulturaj organizoj. En bona ordo, ni ***invadis*** salonojn, kontorojn kaj laborejojn, afable akceptataj ĉiam de la koncerna fakestro. En la redakcia halo, okazis alia fotografado por la morgaŭa eldono de la ĵurnalo. Grandan miron vekis la grandega rotacia presmaŝino kaj la sekcio de linotipoj, kie ĝentile spertaj laboristoj kompostis kaj donacis al samideaninoj, kiel rememoraĵon, metalajn ĵus fanditajn liniojn kun esperantaj salutvortoj. Post afabla adiaŭo oni rapidis al la

### PRELEGO DE PROF. H. MABESOONE

En alia salono de la scienca institucio, ekipita per projekcia aparato, la nederlanda S-ano Prof. H. Mabesoone, kun simpatia aspekto de blonda plenmatura knabo, agrable prelegis pri la bela Nederlando, kun projekcioj de plaĉaj bildoj. Ventmueliloj, kanaloj, digoj, kampoj de tulipoj, svarmo da bicikloj k. t. p. ilustris la klarigojn kaj liveris, dum unu horo, nederlandecan etoson al la hispana kongreso. Rememore al neforgesebla pasintjara ferio, mi estis kaptita de dolĉa melankolio. Ĉe la fino, post kutimaj aplaŭdoj kaj gratuloj, aŭtobuse kaj... senpage, oni diligente venis al la

### LUNĈO DE LA URBESTRARO

En la rava horo de l' krepusko, la ĝardenoj de la urba parko «El Retiro» ŝajnis preta scenejo por monduma ceremonio: larĝaj aleoj, stompitaj perspektivoj de verde iluminitaj heĝoj --sorĉa efekto de magia klorofilo!-- kiel dekoracio por vasta teraso kun bufedo kaj armeo da elegante uniformitaj kelneroj de plej fama hispana koktelisto Perico Chicote. Jen do la riĉa regalo de Madrido al nia kongreso! S-ro P. Górgolas je nomo de la urbestro akceptis kaj salutis nin en tiu feina medio, kie multaj ĉarmaj samideaninoj --sekrete mi scias tion-- helpe de ĉampano kaj likvoroj ***vivis*** la revon, ke ili estas flatataj filmstelulinoj... Kaj, certe, pluraj samideanoj egale dorlotis similan fantazion. Jes, la ĉirkaŭanta romantiko kreis animstaton, kiu efikis ankoraŭ post disiĝo, kiam oni pogrupe hejmeniris sub la nigre-blua mantelo de milda somera nokto.

## SABATE — 27. JULIO

...Sed, sunaj grimacoj de pura mateno forpelis la nokton. Formacio da aŭtobusoj, en gaja karavano, startis de *nia* kampadejo en la placo Hispanio, por la emocioj de

### LA EKSKURSO AL «ESCORIAL»

Je duono de la vojo, iom flanka ŝoseo kondukas al la Valo de l' Falintoj: vasta intermonta spaco, kie, preskaŭ jam finkonstruita, troviĝas originale grandioza monumento al la viktimoj de la civila milito. Laŭ speciala permeso, ni povis viziti kaj admiri la ejon de tiel kolosa verko; ĝi estas granda enireja korto, kun arkada galerio, ĉe deklivo de granita montego, kies interno estas elfosita kaj transformita en egega kripto kaj preĝejo. Ekstere kaj supre, sur krudaj rokoj, alta kruco kaj simbolaj statuoj kompletigas la tutaĵon. La karavano ree marŝas ĝis alia valo, kie kuŝas la someruma vilaĝo El Escorial, apud la fama monaĥejo.

La aŭtobusoj haltas ĉe la ombro de unu el ĝiaj muregoj; la personaro desaltas kaj serĉas lokon por tagmanĝo. Avangarde de esplora grupo, mi ***malkovras*** fonton en arbareto kun restoracio, tre taŭga por la celo. Post manĝo kaj ripozo, kiel scivole rigardemaj turistoj, la kongresanoj eniras respektoplene en tiun konstruaĵon, kiun ĝia kreinto --la reĝo Filipo, la II<sup>a</sup>-- nomis «Palaco por Dio, kabano por la reĝo». Ke tio ne estis vana frazo, oni plene konstatas eĉ en supraĵa vizito; la pompo de la preĝejo, en religia apoteozo, frape kontrastas kun la apudaj privataj ĉambroj de la reĝo: nudaj kalkitaj muroj, planko el argilaj kaheloj, ligna fermita lito, tiel modesta,

ke ĝi aspektas eĉ mizera; jen do la dormejo, kie, post longa terura suferado, stoike mortis la reĝo plej potenca, kiu tiam ekzistis en Okcidento. Krom tio, salonegoj kun pentraĵoj, galerioj kun freskoj aŭ malnovegaj volumoj, en riĉa biblioteko, kaj profunda kripto kun artaj sarkofagoj, el bronzo aŭ marmoro, gardantaj la cindrojn de reĝoj kaj reĝidoj, pravigas la famon de tiu monaĥejo, kiel historia arkitekturaĵo, grava muzeo kaj nacia maŭzoleo.

Ĉe la eliro, la puraj stratetoj kaj somerdomoj de l' vilaĝo invitas al promeno kaj al aĉetado de tipaj rememoraĵoj en bazaroj kaj ĉiovendejoj. Tamen, multaj samideanoj preferas sidi en kafejoj aŭ sur benkoj, ĉirkaŭ fontano en parko, ĝuante venteton, kiu, saturita de aromoj, heroldas la vesperon. Aliaj spitis laciĝon kaj faris viziton al la *Dometo de l' Princo*, ĝis la oka posttagmeze, horo anoncita por alesti al

### LUNĈO DE LA PROVINCESTRARO

Hotelo «Victoria» (Venko) estas mondfama unuaranga restadejo, kiel konvenas al unuaklasa turisma loko. En ĝia teraso, taĉmento da pretaj kelneroj, apud abunde provizitaj tabloj, refoje bildigas scenojn de malavara gastameco, fare de aŭtoritatoj. Hodiaŭ, la regalanto estas la Provincestraro (Provinca Deputitaro) de Madrido, kies Prezidanto mem, lia Ekscelenca Moŝto, S-ro Markizo de la Valdavia, kune kun la urbestro de El Escorial, S-ro Almela, persone bonvenigis nin. Laŭ maniero simpla kaj familiara, li sin turnis al la kongresanaro per tute senemfazaj, sed sinceraj vortoj: ...«ĉar en ĉi tiu epoko de materialismo, vi reprezentas notindan escepton, pro tio ke vi laboras por fakta unuiĝo de l' homaro, pere de universala lingvo. Mi ne scias, ĉu vi sukcesos, sed via nobla idealo estas vere respektinda kaj ĉiel helpinda...» Post reciprokeco en salutoj kaj komplimentoj, regis plej adekvata animstato por frandi kukojn kaj likvorojn, kiujn servemaj teleroj kaj pokaloj senfine prezentis.

Revene al Madrido, la lampoj de niaj aŭtobusoj optimisme lumigis la vojon, ĝis ilin ensorbis la lumegoj de la metropolo, tiam sub kirlego de l' trafiko, en homa lavango, propra de sabato dum nokto.

## DIMANĈE — 28. JULIO

Dimanĉo estas agrafo de semajno, kiel broĉo de laborperiodo. Sed, la fluo de nia programo ankoraŭ regas, eĉ en dimanĉa mateno. Vicas, kiel unua, speciala aranĝo:

### OMAĜO AL PIONIRO D-RO CORTEZO

Plenuminte decidon, estraranoj de la Federacio, kun la kongresa prezidantaro, iris ĝis fora angulo de la urba parko, kie staras monumento garnita per busto de D-ro C. Cortezo, influa pioniro de Esperanto, iama Rektoro de la Centra Universitato kaj dankinda mecenato. En simpla ceremonio, oni tie surmetis belan florkronon kun rubando kaj dediĉo. Tiu vizito utilis plie por honori la memoron de aktivisto, vigla kunhelpanto lia, Pastro M. Mojado, sekretario de tiutempa Hispana Esperanto-Asocio, kiun saĝe prezidis D-ro Cortezo.

La delegitaro revenis; kaj sekve okazis

### LA LITERATURA FESTO

En la salono de la Speguloj de «Centro Asturiano» komforte sidas la tuta kongresanaro, sub prezido de D-ro M. Solá, kiu malfermas la solenaĵon. Mi legas unue, kiel ĝia reĝisoro, la juĝateston pri la ekzamenoj. Ĉiu nomo kaj kvalifiko de sukcesinta kandidato estas ovacie salutata per salvo da aplaŭdoj. Ĉe fino de la alnomado, ĉiuj ekstaris kaj pie silentis honore al la forpasinta S-ano S. Roca Rodó, kiu gvidis la ekzamenojn en lastjaraj kongresoj.

La literatura prezentado komenciĝis per paroladeto, kiun enkonduke mi faris pri la signifo de la beletro, «floro plej bela en la ĝardeno de la kulturo», por altigi sentojn, pensojn kaj agojn super trivialaj aspiroj; ĉarme naive pravigis mian asertton la interveno de infaninoj Marta kaj Elisenda kun knabeto Alberto Mimó, el Sabadell, filo de niaj gesamideanoj Luis Mimó kaj Teresa Lladós. La geknaboj bo-ne-ge deklamis elektitajn versojn de Kalocsay kaj aliaj modernaj poetoj.

S-anino Teresa Lladós mem --mirinda kombino de fizika beleco, spirita delikateco kaj instrua esperantisteco-- regalis la aŭskultantojn per.trafaj deklamaĵoj, kiuj, pro la klara tembro de ŝia karesa voĉo, atingis gradojn de sublima raviteco. Cetere, mi ankaŭ devis roli kiel deklamanto en mal-

longa antologio de originalaj poeziaĵoj, specimenoj de diversaj aŭtoroj kaj skoloj.

En majstra resumo, D-ro Solá, per firmaj trajtoj de riĉenhava retoriko, aludis pri la vanaj pretendoj trovi ĝustan koncepton por la poezio, kiu, ĉar mistero kaj enigmo, ne toleras difinojn. Lia koncentrigita prelego --konkreta stilo en profunda elokventeco-- estis gemo ekstra en la riĉa diademo de la festo, kies facetoj ankoraŭ pliiĝis, kiam S-ro Otaola, nome de la grupo de Bilbao, donacis diplomon kaj cizelitan pladon al nia ekscelenca samideano S-ro J. Ezquerra, estro de la Nacia Blindula Organizo, pro dankinde faritaj servoj.

Paŭzo endas por kvietigi la nervojn kaj satigi la stomakon --jen prozo post la poezio!-- Sed unue oni ricevas informon pri la posttagmeza renkontiĝo por

### VIZITO AL LA UNIVERSITATA URBO

Ĝi estas speco de moderna antaŭurbo, nove konstruita sur la sama tereno, kie kuŝis alia plene detruita dum la milito. Inter aleoj, borderitaj de bukso, disaj aroj da sveltaj pavilonoj, ĉiu adaptita por sia specifa uzo, atestas pri nevenkebleco de la intelekto. Ĉi tiu konsidero estas konsolo, en la momento, kiam promene-promene ni iras al unu el tiuj pavilonoj, por io ĉiam melankolia, sed pozitive sukcesa: la

### FERMO DE LA KONGRESO

En la Ĉefa Aŭlo de la Fakultato de Filozofio, bela aŭditorio en formo de amfiteatro, devas okazi la lasta solenaĵo. Malantaŭ la prezidejo, en duonronda perono, troviĝis la orkestro de la Blindula Organizo, kiu ludis elektitajn komponaĵojn, en distingiĝa koncerto, por plej konvene prepari la spiritojn al adiaŭaj emocioj.

Efektive, kiam S-ro Figuerola, apud D-ro Herrero kaj ceteraj gvidantoj, laŭtigis nomojn de plej konataj kongresanoj, invitante ilin al resumaj salutoj, ili ĉiuj koincidis en la neforgesebleco de tiuj feliĉaj tagoj, kune pasigitaj inter la alternaj turnoj de laboro, amuzo, instruo, distro, ripozo... Tiun senton elverŝis patose la portugala amiko S-ro Nunes; kaj tion mi akcentis, kun tremetoj en la voĉo, fronte al pli ol tricent aŭskultantoj --la TUTA kongresanaro!-- gratulante ilin pro tio, ke nia amaso estas nek frivola koterio nek senkonscia grego, sed sole nur --ĉu ne sufiĉe?-- ***kompreneme*** komprenanta familio, kiu, ĉiam kuna, kvankam multenombra, kiel grapolo, masive partoprenas ĉiujn --*ĉiujn!*-- kongresajn aranĝojn de komenco ĝis fino, de Malfermo ĝis la Fermo...

Kuraĝigaj paroloj de D-ro Herrero kaj stimula kanto de «La Espero» kronis la sukceson de la brava entrepreno kongresi en Madrido. Sed... io mankas ankoraŭ, io grava, ĉar tramoj kaj trolebusoj portas la erojn de tiu prikantita aro al reunuiĝo en

### LA OFICIALA BANKEDO

Sindikata Parko troviĝas iom eksterurbe, en tereno taŭga por ludi, sporti aŭ simple fari nenion... Naĝejo plus aliaj instalaĵoj liveras ĉion necesan, precipe al la junularo, por agrable pasigi feriojn kaj festotagojn. En teraso de la restoracio, kun plaĉa iluminado de kermeso, kies lampionoj sin reflektas sur kvietan akvon de kanalo, sidas la samideanaro sub libera ĉielo. Jes, ĉirkaŭ longa tablo --tre longa-- ili sidas kaj flegas sian apetiton, kiu ade kaj grade malpliiĝas pro revuo de jena

MENUO

*Almanĝetoj*
*Omleto kun ŝinko*
*Rondaĵoj da langusto*
*Rostita kokidaĵo*
*Briko da glaciaĵo*
*Kafo kaj likvoroj*
*Vino: Ruĝa kaj blanka*

Gajeco kaj bonhumoro ĵonglas per kuleroj kaj forkoj, en la ĝazbando de glasoj, teleroj kaj boteloj. La esperantistoj, en sia kongresa festeno, ridetas, ridas kaj ridegas pro la spritaj diraĵoj, kiuj petolas de ekstremo al ekstremo de la longa tablo. Kia signo do pli trafa de homa perfekteco ol tiu, ke ni povas funde ridi, sen riproĉoj en konscienco, ĉar antaŭe ni jam sciis funde peni kaj labori? Jes, sendube...

Anstataŭ tostoj --for la seriozeco!-- kompletigis la kunmanĝon arta folklora prezentado de aragonaj dancoj. Amatora trupo de «Domo de Aragono» en Madrido plektis viglajn turnojn de plej tipaj dancoj

de sia regiono, meze de ĝenerala entuziasmo, kiu kulminis, kiam S-ro De la Puente, je nomo de aragonaj kongresanoj donacis bombonojn al grupo da infaninoj.

La emo daŭrigi cedas al la bezono fini la lastan oficialaĵon. Ne facile estas je tiu malfrua horo *kapti* la deĵorajn veturilojn; sed, *kunpremante* unu la alian, oni sukcesas reveni en la urbocentron, kie, antaŭ ol disiĝo, flirtas adiaŭoj por tiuj al kiuj, kun la programo, finiĝis la ferio.

Multaj aliaj tamen ankoraŭ enlitiĝas lulataj de pensoj pri la sekvonta tago

## LUNDE — 29. JULIO

dum kies daŭro estos unika epizodo la

### POSTKONGRESA EKSKURSO AL

## T O L E D O

Salutante la matenon, kun duono el la tuta kongresanaro, aŭtobusoj trakuras brunajn kampojn kaj vilaĝojn. Iom post iom, la bruneco mildiĝas, bedoj kaj arboj anoncas la proksimecon de rivero Tajo (elp. *Taĥo*) kiu, kvazaŭ arĝenta serpentego, glitas preter la remparo de Toledo, antikva ĉefurbo de la iama vizigota imperio, ĝis la invado de la araboj, antaŭ pli ol mil-ducent jaroj... Pro tio, ĝi fariĝis historia relikvujo, gardanta juvelojn el ŝtonoj kun sedimentoj el plej diversaj kulturoj kaj rasoj.

Desaltinte de la veturiloj, volonte ni lasis nin logi de tiu envolvanta sorĉo, kiun legendoj ŝpinis tra labirintoj de mallarĝaj stratetoj, en kies pitoreskaj anguloj, la imago ŝatas vidi misterajn kelojn, kie bolas miksfluidaĵoj en kaldronoj de alĥemiistoj, tintas klingoj de glavoj sur ambosoj de forĝistoj aŭ delikate metias lertaj manoj de hebreaj oraĵistoj... Altiĝinte super la malalta domaro, gardostaras la bastiono de «El Alcazar», palaco-kastelo kun videblaj cikatroj, kaj levas siajn aĵurajn turojn la gotika mirindaĵo de la Katedralo, kiel zorgemaj ŝirmantoj por ceteraj trezoroj: Preĝejoj, kiuj estas muzeoj pro siaj artaj klostroj aŭ tre valoraj pentraĵoj; privataj domoj, kiuj famiĝis, kiel tiu pro la gloro de El Greco, la ekzaltita genio; rafinitaj masonaĵoj --poemo en arkitekturo-- de sinagogoj vualitaj de nostalgio, kiel tiu de Sankta Maria, la Blanka... plus aliaj kaj aliaj ravitaĵoj ie kaj tie, ne kalkulante la abundajn sukeraĵejojn, kie oni vendas ambrozion en formo de marcipano.

Tagmeze, oni faris paŭzon por kuniri al

### AKCEPTO EN LA URBODOMO

La urbodomo de Toledo plaĉas pro sia familia aspekto. Malgranda vestiblo, kun ŝtuparo kaj pordoj, agrable impresas kiel gepatra domo. En rektangula salono de la teretaĝo, ni estis do hejmece akceptataj de la simpatia urbestro, S-ro José Conde, kiu, ankaŭ kun natura teniĝo de bonkora patro, sin turnis al ni per frazoj spontane sinceraj, kiuj, en funde humana senco, sonis speciale dorlote por ni: «Vi estas noblanimaj personoj, celantaj per reciproka komprenado amikajn rilatojn inter homoj el ĉiuj landoj, el ĉiuj lingvoj kaj el ĉiuj rasoj; estu bonvenaj do en urbo, kiu iel estas simbolo por tiel laŭdinda deziro, ĉar ĉi tie --en Toledo-- dum jarcentoj, pace kunvivis kristanoj, judoj kaj araboj, sub la bona signo de toleremo kaj laboro...»

D-ro Herrero danke respondis kaj prezentis al la ĝentila urbestro kaj ceteraj aŭtoritatoj kelkajn el la kongresanoj. Kiel unu el ili, mi estis invitata diri, esperantlingve, ion pri la ricevitaj impresoj, ĉar la urbestro kaj liaj akompanantoj ŝatus scii kiel sonas la Internacia Lingvo; plezure mi obeis per improvizitaj, kiel eble plej sonore plastikaj, vortoj --almenaŭ tia la intenco!-- kiujn D-ro Herrero tradukis.

Sekvis lunĉo, kiu, honore al la multaj valencianoj, konsistis el la tipaj bongustaj refreŝigaĵoj *horchata* kaj citronakvo, kies franda kvalito estis eĉ temo de konversacio, jam revene en Madrido, vespere, dum la adiaŭa kunveneto en kafejo «Varela».

---

...Kaj, denove, frumatene de mardo, la 30an de Julio, la Valencia karavano iris returne hejmen, tra malsama vojo, por povi haltadi du horojn en Aranjuez, iama kortega restadejo, antaŭ ol sekvi la paŝojn de Don-Kiĥoto, sur la ebenejo de La Mancha, sojlo de la regiono, kie pompas Valencio, mia naskiĝurbo, kiu akceptis nin tute normale, kvazaŭ nenio estus okazinta... kvankam fiere ni ja scias, ke io ĵus okazis: la 18a Hispana Kongreso de Esperanto, en Madrido! **LUIS HERNANDEZ**

### Al UEA-anoj en Hispanujo

Dankeme pro via afabla korespondado al mi ĝis nun, bonvolu akcepti mian adiaŭan saluton de Ĉefdelegito de UEA, kaj noti, por estonta traktado, ke nia kara samideano S-ro Ramón Molera, Hospital, 13, *Moyá* (Barcelona), bonvolis anstataŭi min.

Redanke, amike al vi ĉiuj

**Delfí Dalmau** - Eks-Ĉefd. de U. E. A.

## PARA NUESTRO BOLETIN

(Donativos correspondientes a Agosto-Septbre. 1957)

| | |
|---|---|
| Suma anterior | 2.988 Ptas. |
| J. Anglada - Barcelona | 100 » |
| A. García - Bilbao | 25 » |
| R. Vizcaíno - Valencia | 65 » |
| A. Nunes - Lisboa (Portugal) | 50 » |
| Congresista X X - Barcelona | 50 » |
| J. Figueras - San Esteban Bas | 20 » |
| J. Hernández - Sabadell | 35 » |
| J Gutiérrez - San Martín Tresorillo. | 15 » |
| M. Mayer - Tailfingen (Alemania). | 25 « |
| F. Plá - Valencia | 50 » |
| A. Martínez - Sta. Coloma Gramanet | 10 » |
| F. Bayo - Bilbao | 50 » |
| Kataluna kongresano - Barcelona. | 50 » |
| P. Naranjo - Jerez de la Frontera. | » |
| F. Poses - Tarrasa | 30 » |
| G. Moya - Tarrasa | 30 » |
| Grupo «Payá Miralles» - Mislata | 10 » |
| F. Enfedaque - Madrid | 100 » |
| J. Lencer - N. Smyrna (U. S. A.) | 500 » |
| F. Martínez - Valencia | 20 » |
| M. Alamo - Valverde-Hierro | 10 » |
| F. Abella - Barcelona | 25 » |
| E. Capdevila - Valencia | 25 » |
| A. Cortés - Londres (Inglaterra) | 50 » |
| J. Montfort - Barcelona | 5 » |
| J. F. - Barcelona | 20 » |
| J. Régulo - La Laguna | 90 » |
| F. Máñez - Zaragoza | 50 » |
| J. Pinell - Sabadell | 25 » |
| X. X. - Zaragoza | 25 » |
| Total | 4.553 » |

*Al presente número, la presente lista.*
*A tal señor, tal honor...*

### TESORERIA

Relación de números y agraciados en los sorteos del tercer trimestre.

26 de Julio. N.° 10775 a D. Francisco Abascal, de Sevilla, por su número 75.

26 de Agosto. Núm. 32870 a D. Juan Régulo Pérez, de La Laguna, por su número 70.

25 Septiembre. N.° 34207 a D. Manuel Salom, de Valencia, por su núm. 07



## SFINKSA ANGULETO

### MUŜO VOJAĜEMA

*Muŝo flugas unu metron po sekundo, en direkto al la lokomotivo, interne de vagono en trajno kuranta dek-ses metrojn po sekundo. Por kiom da metroj bezonas forton la muŝo?*

Ĝusta solvo gajnos du poentojn ĝis 15. Novembro.

**SOLVO PRI LA LIBROVERMO**
EN LA PASINTA NUMERO

**La longo de la vojo estas nur 1 cm. Tion oni bone komprenos, sciante, ke la du volumoj staras en biblioteko unu apud la alia.**

Naskiĝis **BENVENUTO**

**Filo kaj unua ido de**
**J. P. Staartjes kaj Henny Staartjes-Schoon**

Lia alveno en la mondon malice igis geavoj viajn geamikojn

**Izak kaj Alida Schoon**
Ooievaarstraat, 9 - HAARLEM - N (Nederlando)

DEZIRAS KORESPONDI

kaj interŝanĝi muziknotojn (pri hispanaj popoldancoj) poŝtkartojn kaj poŝtmarkojn.
Bogamie Avramov
Ivan Dresov, 20 — VAMA (Bulgario)

Itala knabo 14-jara, kun filatelisto. Skribu al: Dasoli Glauco en MARMIROLO Mantova (Italio)

16-jara licea lernanto kun gejunuloj pri ĉiuj temoj. Skribu al:
Jerzy Ochocinski, ul. Marchlewskiego, 29
KWIDZYN (Pollando)

Franca fraŭlino de Tarbes, 22-jara sekretariino, komencantino. Skribu al: Arlette Conte, Hotel Chaperon Rouge Rue de la Marne, RABAT (Maroko)

### ATENTIGO

Pro la reduktiĝo decidita en la Kongreso, la venonta numero, kun dekdu paĝoj, aperos komence de Decembro. Bonvolu atenti pri tio!

**Eldonkvanto de ĉi tiu numero: 1.300 ekzempleroj**

● **¡OBSEQUIAD!** *A todos vuestros amigos y corresponsales del extranjero con el presente número extraardinario, que puede adquirirse a* ocho *pesetas el ejemplar, Si se nos mandan las direcciones, lo expediremos directamente, corriendo a nuestro cargo el franqueo*

FERIS - GRAN VIA M. TURIA, 28 - VALENCIA



Lia Ekscelenco, Markizo de la Valdavia, Prezidanto de la Madrida Provincestraro, bonvenigas la Kongreson en Hotelo «Victoria» de El Escorial. La urbestro, S-ro Almela, ridetas kun brakoj surbruste.



Grupo da kongresanoj antaŭ domo de scienca institucio.
Unuavice: S-roj Hernandez, Padráo, Enfedaque, Régulo Pérez, Dalmau kaj Figuerola.



La gesamideanoj de Cheste, kun kelkaj «entruduloj», dum la lunĉo de la urbestraro